# Sud-Rejna Kuriero

Februaro 2016

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel** kaj
**Mulhouse-Esperanto**

N°61



Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch


*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*



En Akeno

*En decembro okazis la Zamenhof-festo en Frajburgo, kun interesaj prelegoj en la nova kunvenejo de la grupo.*

*Jen raporto pri la tute nova jarfina arangô en Germanio: Luminesk.*

*Komence de januaro okazis nia 3-reĝa festo en Espace 110 kun pluraj partoprenantoj en agrabla etoso.*

*Regule ni rendevuas por niaj verdaj fadenoj, ankaŭ en la nova jaro 2016.*

*Kio okazis en la jaro 2015, pri tio detale raportas Ivo en sia agad-raporto por nia Ĝenerala Asembleo la 5an de februaro, en nia kursejo en Espace 110.*

*En aprilo okazos la regiona staĝo de Esperanto-France-Est en Art sur Meurthe.*

*Sur la lasta paĝo ni povas ĝui la bondezirojn de Bernard, kiu trovas la taŭgajn vortojn por ke 2016 estu agrabla.*

*André Grossmann*

***Feliĉan kaj sano-plenan novan jaron 2016***

## Programo 2016

**ESPERANTO - SOCIETO BASEL**

| | | |
|---|---|---|
| **Lunde** | **29.2.2016** | **Verda fadeno en la restoracio la Poste en Saint-Louis** |
| **Ĵaŭde** | **31.3.2016** | **(pro Pasko)** |
| | | **Ĝenerala jarkunveno 2016** |
| **Lunde** | **25.4.2016** | **Verda fadeno en la restoracio la Poste en Saint-Louis** |
| **Ĵaŭde** | **19.5.2016** | **(pro Fronleichnam)** |
| | | **Monata kunveno : Grün 80** |
| **Lunde** | **27.6.2016** | **Verda fadeno en la restoracio la Poste en Saint-Louis** |

**FERIOJ**

| | | |
|---|---|---|
| **Ĵaŭde** | **22.9.2016** | **Monata kunveno : Aktuala temo** |
| **Lunde** | **31.10.2016** | **Verda fadeno en la restoracio la Poste en Saint-Louis** |
| **Ĵaŭde** | **24.11.2016** | **Monata kunveno : Programo** |
| | **12.2016** | **Zamenhofa-Festo en Francio eble Colmar** |

**Nicole Béroud**

## KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2016-2018

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.
La bulteno estas ricevebla en Papera versio aŭ Reta versio (pdf)

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**
Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| **Jaro** | **Kotizo** | **Abono** | **Kolora ekzemplero** |
|---|---|---|---|
| 2016 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | 14 eŭroj |
| 2017 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |
| 2018 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |

## Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2016, Hiroŝima

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2016 Hirosima, konsistas el 22 organizoj kaj la municipo Hirosima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 8-a de marto, 2016, por la Internacia Virina Tago de UN, ni havos kunvenon por kunlaboro per saĝoj kaj fortoj, kaj antaŭenpuŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hiroŝima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.

Hodiaŭ ni alfrontas krizon de ĉena reago de teroro kaj venĝo post la malvarma milito post la dua mondmilito, kaj ni demandas pri nia mondkoncepto en abundaj informoj. En 2015 la japana registaro ŝanĝis elektoleĝon por publikaj oficoj, por ke ekde 18 jaraĝaj homoj havu la voĉdonrajton. Gravas ke, ni mem kiel suvereno elektu la ĝustan informon pri la socio
por prijuĝi kaj praktiki la rajton.

La temo de Internacia Virina Tago de 2016 estas “La estontecon malfermas ni mem. Trovu la veron el abundaj informoj. ” En la tago ni aŭskultos prelegon de ĵurnalisto de Japana Ĵurnalista Asocio pri la nuna situacio kaj taskoj de ĵurnalismo, por ke precipe juna generacio povu praktiki sian voĉdonrajton kaj malfermu sian estontecon, kaj kune ni pripensos pri elekto kaj agado al vere paca mondo.

El la atombombita urbo Hiroŝimo ni alvokas ĉiujn en la mondo al ne perforta solvo de la
problemoj por paco.

Bonvolu doni vian opinion por nuligi nukle-armilon kaj militon, ni petas. Vian mesaĝon ni ekspozicios en kunvenejo de la urbo.

S-ino MATUMURA Aiko
Prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2016, Hirosima
La municipo Hiroŝima

**Limdato kaj aliaj: la 10-a de februaro 2016.**
**Maksimume sur unu leterpapero A-5 formata. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni.**
**Kun notoj petataj: Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbo-nomo), lando.**
**Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko:**
**osioka@mua.biglobe.ne.jp**
**Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio**

# Agad-raporto de Mulhouse-Espéranto por la jaro 2015

Kursoj por progresantoj okazis ĉiu-semajne, plejofte vendrede en Espace 110. La nombro de la gelernantoj variis de 2 ĝis 3.

Kursoj por komencantoj okazis lundon en Maison du Temps Libre. Nombro de gelernantoj : 2

La kunvenoj "verda fadeno" regule okazis alterne en Mulhouse kaj St Louis, la lastan lundon de ĉiu monato. Nun estas 14 personoj enskribitaj en la dissendo-listo verda-babilejo.

En la 9a de januaro okazis la tri-reĝa festo. Ĉiuj povis gustumi la tortojn kaj la vinon!

La Ĝenerala Membro Kunveno estis prokrastita al la 24a de februaro pro foresto de Andreo. Ĝi okazi en nia kursejo en Espace 110.

Roberto informis en lernejo en Ĝenevo la 27an de februaro.

Regiona staĝo okazis en Verdun la 3-4-5ajn de aprilo. La staĝo estis organizita de Catherine Kremer. Okazis prelegoj de Rodica Todor pri la militoj en la mondo kaj pri Rumanio. La partoprenantoj vizitis la urbon kaj la batal-kampojn. Por la distra vespero koncertis Guillaume Armide.

En majo, junio kaj julio kelkaj membroj deĵoris ĉe "Vivu via strato". En ĉiu dimanĉo matene, ĉe la bordo de l'Ill okazis la festo. Okazo por multaj babiladoj kun scivolemaj pasantoj.

La 13an de junio okazis la amika tago kaj komuna manĝo en Saulxures-sur-Moselotte organizita de Ginette Martin. La partoprenantoj vizitis la Fort du Pramont.

De 25an de julio ĝis la 1an de aŭgusto okazis la Universala Kongreso en Lillo. Multe da anoj de nia asocio partoprenis ĝin.

Pluraj membroj de la asocio partoprenis la 37an Bavelo-seminaron en Pforzheim je la 16 – 17 – 18aj de oktobro.

La 14an kaj 15an de novembro ni havis deĵortablon ĉe Bédéciné en Illzach

La 21an kaj la 22an de novembro ni partoprenis en Ungersheim ĉe foiro pri ekologio kaj justa komercado.

La Zamhofa festo okazis en Frajburgo dimanĉe la 13an de decembro.

Partoprenis ankaŭ membroj de nia asocio al :

- Vojaĝo tra la sud-orienta Rumanio organizita de Rodica Todor.
- La Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo en Roses, Katalunio en oktobro.

SRK aperis 4 foje.

Nia retejo http://mulhouse.esperanto.free.fr

Niaj dissendo-listoj por facile komuniki:

- mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr
- verda-babilejo@googlegroups.com

Yves Stutz

## edukado.net/

Ni informas vin ke en la jaro 2016 **edukado.net** komencas grandan, novan projekton, kiun ni nomis **EKPAROLU!**
Celo da la projekto:
• Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj.
• Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukode de komencintoj
• Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon
Baza ideo
Ene de **edukado.net** ni kreus surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale treinitaj esperantistoj)
trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn.

Legu pli ĉe la paĝo: **http://edukado.net/novajhoj?id=601**

## KER-ekzamenoj en Francio la 16an de aprilo 2016 kaj stud-periodo

Jannick Huet-Schumann (estrino) kaj Christophe Chazarein (ekzamen-responsulo) atendas vin en **kastelo Grésillon** (Francio) **de la 8a ĝis la 16a de aprilo 2016** por la **6a PRINTEMPaS** kun tri kursoj: por komencantoj kun Marion, por prepari la ekzamenon B1 kun Christophe, kun Radojica Petrovic (ILEI-estrarano) por B2 kaj C1. Vidu http://gresillon.org/printempo kaj aliĝu nun por havi rabaton: http://gresillon.org/aligho

# Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto

Jen la venontaj datoj por niaj verdaj fadenoj

- 29an de februaro en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis
- 21an de marto en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- 25an de aprilo en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis
- 30an de majo en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- 25an de junio en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

Vi estas varme invitataj ilin partopreni por havi la okazon aŭdi Esperanton kaj tute amike babili kun la ĉeestantoj.
Ni jam kutimas poste kune vespermanĝi, simplaj menuoj en Mulhouse. En Saint-Louis estas pli da elekt-eblecoj.

La 25an de januaro ni estis 8-ope.



Bernard diligente konsultas etimologian vortaron



# Zamenhof-festo en Frajburgo la 13an de decembro 2015.

Laŭ-vice niaj Zamenhof-festoj okazas en la tri landlimaj landoj, Svislando, Germanio, Francio. Ĉi-jare la grupo de Frajburgo invitis la geamikojn de la land-limaj regionoj.

Escepte ĝi okazis ĉi-foje dimanĉe, ĉar por la planita sabato la salonoj estis jam rezervitaj. Ni rendevuis ĉe la nova renkontiĝejo de la Frajburga grupo je la 14a, **"Treffpunkt", Salono 5. Schwabentorring 2**; facile atingebla dank'al mapo aperinta en lasta SRK.

Raportas pri la evento Manfred Westermayer



Ni havis tre agrablan Zamenhof-Feston. Pro la dato ŝovita al Dimanĉo povis veni malpli multaj ol kutime. Plejmultaj alvenis per trajno (de Müllheim, Breisach, Stuttgart) por ne havi la problemon trovi park-lokon en Frajburgo Krom kafo-klaĉo kun spicitaj bakaĵoj ni aŭdis:

- prelegon de Fernando pri sia projekto de metio-lernejo en Angolo, interalie, kun agrikultura grupo, kiu plantos fruktarbojn (ekzemple Moringa, kiu ŝajnas esti bona por la sano), kaj Artemisio (medikamento kontraŭ Malario).
- prezenton de mi, Manfred, pri la projektoj en Afriko, kiujn subtenas ankaŭ la Frejburga grupo: provizi trink-akvon en Kalima, D.R. Kongo (la 3-a parto nun estas en la konstru-fazo), kaj due pri Mazingira en Tanzanio (orfoj, "Esperanto" mez-lernejo, sunflora oleo, trinkakvo):
- Alois aparte alvenis por kunporti kolektaĵon el la di-servo en Stuttgart por la sekvaj operacioj de kripligitaj infanoj (pro malaria-medikamento) - nun jam 3 infanoj atendas operacion en Daressalaam, kaj aliaj atendas ankoraŭ...



- En 2016 ni subtenos konstrui pluvakvo-baseno(j)n tie por savi la bonan grund-akvon por provizi trink-akvon: nia parto estus 8 mil Eŭroj (por materialo), la man-laboroj (fosado, ...) estos la kontribuo surloke.Ni kolektas monon je la AVE-konto ĉe UEA: avex-z



- Andreo kunportis nin al vojaĝo tra Rumanio - dank al esperantistino, kiu organizas ĉiujare tian vojaĝon. Ni vidis multajn fotojn de urboj, vilaĝoj kaj pejzaĝoj, ĝis la delto de la Danubo. Kaj Roberto aldonis siajn spertojn pri alia vojaĝo en Rumanio. Indas viziti Rumanion. Ankaŭ en junio 2016 okazos simila vojaĝo tra sud-orienta parto de Rumanio



- Edmond donacis al ĉiuj de li tradukitan novelon "La harplektaĵo" de Sylvie Reff, el norda Alzaco, pri maljuna najbarino de la verkistino ...; li ankaŭ legis parton de tiu verketo kaj prezentis poemon de la aŭtorino en tiu regiona varianto de la alzaca - feliĉe kun traduko en Esperanton.
- finfine ni vizitis la apudegan picejon por fina babilado kaj manĝo.
- Ni ĉiuj bedaŭris, ke Nicole ne povis ĉeesti pro rompita osto kaj deziras al ŝi  bonan resaniĝon.

Sylvie REFF, fama nuntempa alzaca poetino, verkis en sia regiona alzaca dialekto rakonton titolitan <u>Der Zopf</u> (<u>La harplektaĵo</u>). Jen la komenciĝo de la rakonto.
La kovril-paĝan ilustraĵon realigis nia samideano Armand HUBERT.

Jen rakonto pri mia najbarino
87-jara kamparanino
7 gefiloj, forpasinta edzo,
kuirejo kun stamfita tero,
posedis nur sian harplektaĵon
neniam ajn tranĉitan.
La 15-an tagon de ŝia restado
la Maljunulejo fortranĉis al ŝi ŝian
harplektaĵon ŝian langon/lingvon
ŝian vivon.
Jen ŝia vivrakonto
per virina hararo.




Eblas mendi ekzempleron ĉe nia kasisto je 2,50 eŭroj inkluzive kun sendkostoj.

# LUMINESK'

**Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio**

Fine de 2014 okazis la 31a Internacia Festivalo en Jülich. Ĝi estis vere la lasta IF, brile organizita de HDP, Hans-Dieter Platz.. Restis la demando, kiu eventuale transprenos organizadon de simila aranĝo, sciante, ke okazas similaj aranĝoj por junuloj kaj por familioj.
Jen prezentiĝis Luminesk organizita de Germana Esperanto-Asocio. Sed la informo venis iom malfrue en la jaro, eble pro tio, al tiu unua Luminesk ĉeestis iom malpli da partoprenantoj.
Jen raportas pri ĝi Dieter Rooke.



Kaŝi: virtuoza pianisto, kantisto

Luminesko, nova Esperanto-renkontiĝo en Germanio 2015 12 28-2016 01 04 Jen kiel klarigis ĝin la ĉefa organizanto Andreas Diemel, komisiito de GEA-Germana Esperanto Asocio: Luminesk priskribas la etoson, kion oni sentas, kiam oni dum malhela vintra tago veturas al Esperanto-renkontiĝo.

En lia klopodo oferti plezuran programon, diligente kunlaboris teamanoj: S-ro Sebastian Kirf, prezidanto de GEA, S-ino Julia Noe, eksredaktoro de TEJO-aktuale, membro de TEĴA-Tutmonda E- ĵurnalista asocio S-ro Alfred Schubert nuna prezidanto de TEĴA-eksa ĉefredaktoro de germana E- aktuell.



Partoprenis la aranĝon ĉ. -50 s-anoj el ok landoj, la plimulto el Germanio.

La festivalo Luminesk daŭrigas la longdaŭran tradicion de IF-Internacia festivalo.

La junulo Andreas Diemel plu-portas la torĉon post tridekjara periodo de sia antaŭulo HDP- Hans Dieter Platz.

Espereble ĝi same brile lumas kaj sukcesas kiel la neforgese-blaj IF-oj.

La programo kaj mastrumado meritas laŭdon, ĉio ĉi disvolviĝis per fame germaneca precizeco kaj akurateco!



Vizito al gazetara muzeo

La programo ofertis du IVU- oj (internacia vintra universitato), pri Projektiva Geometrio gvidita de Yashovar-dan Singh.

Alian sesion profesoro Amri Wandel faris pri relativec-teorio. Okazis sukcesa ekzameno de parkera kantado de E- himno " La Espero".




Julia proponas diversajn teojn en la gufujo

S-ino Liu Jun prelegis pri histo-ria kaj nuntempa svisa fervojo kaj pri ŝia E- verda vivo- projek-ciante lumbildojn sur grandan ekranon.

S-ino Tatjana Luskotova el Ru-sio prelegis pri E- instruado, eblis aŭskulti profesian prele-gon pri abel-bredado, kaj eĉ gustumi mielan vinon.

Kun Tatjana ni flugis al Brazilio, Tajlando, kaj Siberio. Kun Amri al Nepalo, Israelo, kaj sur monton Kilimanĝaro en Tanzanio.

Ni eksciis pri la germana fabelaro de fratoj Grimm, kiel ĝi edife efikas al junaj infanoj.

La tuttaga ekskurso kondu-kis al urbo Akeno, la iama sidejo de imperiestro Karlo la granda- kaj al diversaj mu-zeoj.

En duontaga ekskurso eblis admiri mezepokan urbon Monschau kun mustardo-



muelejo, kaj val-baraĵon de rivero Rur.
Dum Vespera programo elpaŝis kuraĝe studento el la regiono. kiu laŭtlegis E-version de fantazia rakonto pri batalantaj spiralaj nudeloj en ceramika pelvo.
La stelo de muzika programo estis junulo kun E-nomo "Kaŝi". Li ravis ĉiujn per verva pianludo kaj parodiema voĉo.
La silvestron ni kise tostis sur tegmento de la junulargastejo, grimpinte altan feran ŝtuparon.



Andreas gratulas al Julia

Surprizis nin la koncerto de Birke kaj Bertilo Wennergren, kiuj ĵus renevenis de NR = novjara renkontiĝo en Saarbrücken.
Post vespera programo ni diboĉis





Koncerto de Birke kaj Bertilo

en "Knajpo ", taverno, kie sidadas babilemaj alkoholemuloj, kaj en romantike kandela Gufujo, kie estas servata diversaj teoj kaj tizanoj.



Promenado de la unua de januaro

Por venonta " Luminesko" iuj proponis multajn plibonigojn kiel prezentadon de skeĉoj aŭ teatraĵoj.
Ek-al la sekva dua- pli grandioza Luminesk`!
Bis- bis raportis: Dieter Rooke

# Tri-reĝa festo en Espace 110

La 8an de januaro 2015 okazis nia unua kunveno en la nova jaro ĝuste por festi la tri reĝojn.

Respondis al tiu invito 12 personoj. Bela ĉeestantaro ĉirkaŭ la tablo de nia kursejo en Espace 110. Ankaŭ ĉeestis nova lernantino por la kurso de komencantoj. Estis surtabligitaj boteloj da blanka vino, da suko kaj 3 migdalo-tortoj por povi elekti la 3 reĝojn. Fakte elektiĝis Irène kaj Edmond.



Malgraŭ tio, viglis la diskutoj ĉefe pri la laste aperinta artikoloj en L'Alsace rilate al nia Esperanto-kurso en Espace 110.

Tiel komenciĝis por nia grupo la nova jaro 2016, kun novaj planoj en agrabla kaj simpatia etoso.





## ESPERANTO EN LA REGIONA GAZETO L'ALSACE


LUNDI 4 JANVIER 2016 | L'ALSACE |

### L'ALSACIEN DE LA SEMAINE

# André Grossmann

Avec 696 votes et 41 % des avis exprimés par nos lecteurs et internautes, c'est André Grossmann qui a été désigné premier Alsacien de la semaine de 2016.

Informaticien à la retraite, André Grossmann donne des cours d'espéranto à l'Espace 110 d'Illzach. *« C'est une langue vivante qui continue à s'enrichir. Chaque année, de nouveaux mots apparaissent... Des gros mots comme des proverbes ! Elle est vivace en Pologne et en Hongrie, émerge au Brésil et en Chine... »*, plaide-t-il volontiers. Natif de la région de Thann, il dit être tombé dans la marmite de l'espéranto à 20 ans : *« Je voulais commencer par l'italien, puis on est venu me souffler qu'il y avait beaucoup mieux à apprendre... »*




**André Grossmann, chantre de l'espéranto.** Photo L'Alsace/Darek Szuster

En seconde position, en obtenant 31 % des choix exprimés, le Dr Mohamed Bentires-Alj. Ce chercheur, qui vit à Kembs, a décroché le 11 décembre, au Texas, le prix de la recherche 2015 de l'AACR (American Association for Cancer Research).

Enfin, 3[e] du vote de la semaine, le Strasbourgeois Haze Kware. D'abord pianiste de jazz, il s'est tourné vers la photographie il y a six ans. Il participe notamment au projet de l'association Alternatives d'Oberhausbergen, qui veut promouvoir la diversité culturelle par la création d'événements.

En decembro 2015 juna ĵurnalisto de la regiona gazeto L'ALSACE telefonis al André Grossmann kaj rendevuis kun li en la sidejo de Mulhouse-Espéranto en Espace 110 (Illzach). Kurso estis anoncita. Bedaŭrinde venis nur Yves STUTZ. Tio ne malhelpis babiladon pri Esperanto kaj klarigon pri ties funkciado – la ĵurnalistoj ne estante ĉiam la samaj laŭlonge de la jaroj!!!!

Li ankaŭ telefonis al Bertrand Wick, Bruno Flochon kaj mi mem.

**Honesta artikolo**

Kaj la artikolo aperis la 20-an de Decembro. Ni konfesu, ke ĝi ne estas laŭda pri niaj sukcesoj, sed mi opinias ĝin honesta. Kelkajn tagojn post la aperigo mi skribis al la ĵusnalisto dirante la samon: ke li verkis honestan tekston. Samtempe mi profitis por plu-informi lin. Kaj. . . venis telefonalvoko de li! Li dankis pro mia reago aldonante ke maloftas reagoj de intervjuitoj. Kompreneble mi plu-informadis lin.

**Finfina triumfo**

Vera surprizo posta estis nova malgranda artikolo kun foto de André GROSSMANN komence de Januaro 2016! La gazeto L'ALSACE proponis al siaj legantoj, elekti perrete inter tri kandidatoj la "alzacanon de la semajno". Pozitive surpriza rezulto: 41% de la voĉdonintoj balotis por André GROSSMANN!

Tio pruvas, ke per la esperantistaj dissendolistoj eblas atingi ion, almenaŭ pri informado de la publiko. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne sufiĉe multnombras por iĝi premgrupo ĉe politikistoj!

E. L.

**ESPERANTO-NANCY-54 kaj ESPERANTO FRANCE-EST en amikaj rilatoj kun BAVELO invitas vin al la :**

# 79a Regiona Staĝo de Esperanto
## la 22/23/24ajn de aprilo 2016
## en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe
## 36 avenue de la Chartreuse,
## FR-54510 ART SUR MEURTHE
## (N.48.66217° E.6.25104°)

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en verda kaj trankvila distrocentro je dek kilometroj de Nancio.
Meze de 11-hektara parko proksima de rivero Meurthe, ni disponos je unu el la 6 konstruaĵoj por laŭplaĉe lerni, babili, ridi, aŭskulti prelegojn, ĝui kantan spektaklon, rigardi farmbestojn … aŭ trafoliumi la 700 titolojn de nia libroservo !
Ni ankaŭ povos manĝi kaj dormi surloke kaj turismi en la ĉirkaŭaĵo.
Venos specife al nia staĝo : Iŝtvan Ertl, kiu prelegos pri literaturo, Nataŝa Bertse el Svedio, kiu kantos dum la sabata spektaklo kaj Catherine Kremer, kiu faros prezenton pri la Unua Mondmilito.




Por atingi C.L.A.M. el la staci-domo de Nancy, uzu la buson de linio 13, kaj eliru ĉe la haltejo "Repentir"

| | |
|---|---|
| **Por pliaj informoj :**<br>esperanto-nancy-54@laposte.net<br>poŝtel. 00 33-(0)6.76.54.77.78<br><br>**Daŭre aktualigitaj informoj:**<br>http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr | La aliĝ-kotizo entenas la partopre-non al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.<br><br> Eksterlandaj partopre-nantoj ricevos senpage nian bultenon **La Infor-milo** dum unu jaro. |

| ALIĜOJ | |
|---|---|
| Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio | 25 € |
| Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio | 40 € |
| Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto) | 18 € |
| Junulo inter 10 kaj 25 jaroj | 12 € |
| Infanoj malpli ol 10 jaroj | 3 € |

***Atentu:***
***la nombro de disponeblaj litoj estas limigita: la unuaj respondintoj estos la unuaj servitaj. Se ne plu estos litoj en du-lita ĉambro, eble povos esti proponita lito en plur-lita ĉambro, aŭ necesos trovi ĉambron en proksima hotelo.***

| | |
|---|---|
| 1 lito por unu nokto en dulita ĉambro: | 15 € |
| Mantenmanĝo: | 4 € |
| Tag- aŭ vespermanĝo sen trinkaĵo (eblas vegetarana manĝo) | 10 € |
| 1 lito por unu nokto en dulita ĉambro + matenmanĝo | 19 € |
| duon-pensiono: 1 lito por unu nokto en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 1 manĝo sen trinkaĵo | 26 € |
| kompleta pensiono: 1 lito en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 2 manĝoj sen trinkaĵo | 32 € |

**Aliĝilo** por la **79a Regiona Staĝo de Esperanto**
**la 22/23/24ajn de aprilo 2016**
**en FR-54510 ART SUR MEURTHE**

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo | Malpli ol 25 aŭ studento | Aliĝ-kotizo | Elektita kurso |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | ĉef-aliĝanto | | | | |
| 2 | kun-aliĝantoj | | | | |
| 3 | | | | | |
| 4 | | | | | |

Adreso

Mi preferas vegetaran manĝon (signu) ☐

Telefono: Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €
per ĉeko ☐ per ĝiro ☐ al Esperanto Nancy 54 CCP 4786-82 J NANCY
Eksterlandanoj pagos surloke.
**Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.**

Mi deziras ricevi mapeton por helpi dum la alveno al la staĝo (krucumu) ☐

| **Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en C.L.A.M.** | Vendrede 22 | Sabate 23 | Dimanĉe 24 |
|---|---|---|---|
| Matenmanĝo | | | |
| Tagmanĝo | | | |
| Vespermanĝo | | | |
| 1 lito en du-lita ĉambro | | | |

# Provizora Programo:

**Vendrede 22-an de aprilo 2016**

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 19a Vespermanĝo
- 20a Interkona vespera,
  Ebleco viziti Nancion por la interesatoj

**Sabate 23-an de aprilo 2016**

- 8a00 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al la Muzeo pri la salo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la Libroservo
- 15a Kursoj A, B, I
  + prelego de Iŝtvan Ertl
- 18a libroservo
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero: kantado de Nataŝa Bertse

**Dimanĉe 24-an de aprilo 2016**

- 8a00 ĝis 9a00 Matenmanĝo
- 9a00 /10a30 Kursoj A, B, I, Daŭrigo de prelego de Iŝtvan Ertl
- Prezento de Catherine Kremer pri la unua mondmilito, por la anoj de la paroliga kurso kaj aliaj interesatoj.
- 10a30/12a Daŭrigo de la tri kursoj kaj de la prelego de
  Iŝtvan Ertl
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Fino de la staĝo
  (eble kunveneto de la komitato de Espéranto France-Est.)

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**
Micheline Colnot
15 rue de Lavaux
54520 LAXOU
**Ĉekoj nome de:**
**Esperanto Nancy 54**
CCP 4786-82 J NANCY

**Pliaj informoj ĉe**
esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝ-tel. 00.33.(0)6.76.54.77.78
La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Nancio
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Nataŝa Bertse.



**KURSOJ**

**A: Komencantoj (débutants)**
Cours pour débutants par Catherine Hel.

**B: Paroliga kurso**
Gvidas Edmond Ludwig

**D: Seminario:**
Iŝtvan Ertl pri literaturo
Catherine Kremer pri la Unua Mondmilito

**I: Infana kurseto (Ginette Martin)**
**KURSOJ (kurslibro aĉetebla surloke eble estos necesa)**

# Esperanto en Vikipedio kaj WikiTrans
# Esperanto chez Wikipedia et WikiTrans

Vikipedio
La libera enciklopedio




En Vikipedio estas nun 225.305 artikoloj - Chez Wikipedia il y a actuellement 225.305 articles en espéranto.

Krome, en WikiTrans, aŭtomate tradukita el la anglalingva versio de Wikipedia al Esperanto, la nombro da artikoloj estas nun respektive :

Par ailleurs, chez WikiTrans, le nombre d'articles automatiquement traduits de la version anglaise de Wikipedia sont respectivement :
- 4.622.554 (Esperanto – espéranto)
- 5.068.804 (angla – anglais)

De la 25a de januaro ĝis hodiaŭ, 31a de januaro, la nombro de la artikoloj de Wikipedia EN kreskis de 5.063.907 ĝis 5.068.804 t.e. +4.897
Du 25 janvier à ce jour, 31 janvier, le nombre d'articles de Wikipedia en anglais est passé de 5.063.907 à 5.068.804 c.-à-d. +4.897

Dume la nombro de la artikoloj aŭtomate tradukitaj al Esperanto kreskis en WikiTrans de 4.615.402 ĝis 4.622.554, t.e. +7.152
Pendant ce temps les articles automatiquement traduits en espéranto sont passés chez WikiTrans de 4.615.402 à 4.622.554, c.-à-d. +7.152

WikiTrans : http://epo.wikitrans.net/
Vikipedio : https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto (32a loko inter 291 lingvoj / 32e place parmi 291 langues).
Henri

# Nia Kalendaro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **Februaro 2016** | **5**<br><br><br>**5 - 26**<br><br><br>**29** | Nia grupo Mulhouse-Esperanto kunvenas por la Ĝenerala asembleo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "de la poste" 10 strato de Huningue en Saint-Louis. |
| **Marto 2016** | **4 - 18**<br><br><br>**21** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21a en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse |
| **Aprilo 2016** | **7 - 22 - 29**<br><br><br>**25** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "de la poste" 10 strato de Huningue en Saint-Louis. |
| **Majo 2016** | **6 - 13 - 20 - 27**<br><br><br>**30** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21a en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.






Vintro 1956. Bernard kaj lia neĝhomo.
Paĉjo multe helpis.

Akvarelo reproduktita kun la afabla permeso de S-ro Georges RATKOFF.

Esti infano, konstrui neĝhomon, vivi sian vivon, estas agi prefere ol nenion fari, realigi ion kun la aliaj, kunmeti la tradicion, la kulturon kaj la naturon.

La homoj estu centre de ĉiuj pensoj kaj agoj. Ni ne ĉesu provizi ilin por aŭtonomio kaj laŭdi ilin pro iliaj valoro kaj meritoj.

Ne malesperu pri la homoj. En ili nenio estas malbonega, krom ideoj aŭ agoj cele noci al si mem aŭ al la aliaj.

La homaj rajtoj estu la devoj de ĉiu. Ke neniu ignoru ilin. Ke neniu tak-su sin senkulpa pri ili.

Ke la racio, la saĝo kaj la volo interkonsenti mobilizu kaj gvidu nin por la respekto de la vivo.

Tiel 2016 estos Bona Jaro.

Bernard kaj Odette BEHRA